

N. N. 32, Burĝonis rozarbe- do	N. N. 32, Elkreskis roz- branĉeto	N. N. 32, A spotless roze is growing	N. N. 32, Jen ĉiamviva Rozo	N. N. 32, En rose så jeg sky- de
<i>tradukita de Guido Holz</i>	<i>tradukita de Joachim Gießner</i>	<i>tradukita de N. N. 33</i>	<i>tradukita de Leland Bryant Ross</i>	<i>tradukita de Thomas Laub</i>
1. Burĝonis roz-arbedo el delikata sin' laŭ olda kant-heredo, Jiŝaj la origin'; ekĝermis ĉarma flor' dum frosta vintro-tempo je noktomeza hor'.	1. Elkreskis rozbranĉeto el rozarbust' de Di'. Aŭguro de profeto rakontis jam pri ĝi. Naskiĝis rozfloreto meze en vintra nokto laŭ diro de profet'.	1. A Spotless Rose is growing, Sprung from a tender root, Of ancient seers' foreshowing, Of Jesse promised fruit; Its fairest bud unfolds to light Amid the cold, cold winter, And in the dark midnight.	Jen ĉiamviva Rozo laŭ vorto de profet' El la Jiŝaja ŝoso ekkreskis kun impet'. Ĝi venis, hela Flor', en frida tempo vintra Je noktomeza hor'.	En rose så jeg skyde op af den frosne jord, alt som os fordum spåde profetens trøsteord. Den rose spired frem midt i den kolde vinter om nat ved Bethlehem.
2. El virgulin' beata, mirinda roz-arbed', elvenis flor' benata laŭ diro de profet'. Laŭ sankta Di-ordon' ŝi naskis infaneton por nia sav' kaj bon'.	2. Ja naskis tiu rozo - Jesaj' prognozis ĝin - el sia korpo sproson Mari' la virgulin'. Laŭ dipotenca vol' ŝi naskis Di-infanon por tuta mond' konsol'.	2. The Rose which I am singing, Whereof Isaiah said, Is from its sweet root springing In Mary, purest Maid; Through God's great love and might The Blessed Babe she bare us In a cold, cold winter's night.	Jesaja ĝin anoncis, la menciita Flor'; Maria ĝin responsis el patrin-ama kor'. Ŝi naskis Rozon por klarigi Dian amon Je noktomeza hor'.	For rosen nu jeg kvæder omkap med Himlens hær: en jomfru var hans moder, Maria ren og skær. I ham brød lyset frem midt i den mørke vinter om nat ved Bethlehem.
3. Kaj ĉi floreto belas, amindas per parfum'; la nokton ĝi forpelas per sia brila lum', nin helpas el mizer', el pek' kaj morto savas; Li, hom' kaj Di' en ver'.	3. Kaj tiu belfloreto tre hele lumas ĝi. Obskuron la brileto forprenas nun de ni. Vi hom' kaj vera Di' el pekoj kaj suferoj estas savant' por ni.		Ĉi tiu milda Floro per sia dolĉ-arom' Heligas per Digloro la vojon de la hom'. Ja homo, tamen Di', ĝi ŝarĝojn malpezigas Kaj homojn savas ĝi.	Den rose fin og lille har dejlig duft og skær, den lyse for os ville og sprede mørket her. I sandhed mand og Gud, af syndens nød og pine han nådig hjalp os ud.
...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Anglan de N. N. 33.

Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamu1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de THOMAS LAUB.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skyde kaj http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html. Pri Thomas Laub vidu la retejn http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub.